


La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 5/1985 ★ Kr 8,50

Ingemund Bengtsson:

Al homoj kiuj diras ke Esperanto estas nur 100 jara revo, mi respondas ke la revo pri paco estas pli ol 1000-jara kaj ni ja ne ĉesas je tiu revo.



Prezidantŝango:

eksprezidanto Roland Lindblom transdonas la martelon al la nova prezidanto Karin Lindquist.

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet
måndag - torsdag kl. 17-19.
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-
förbundet.

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 75 kr
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvinpinto. Om du inte får den, med-
dela födelseår till Esperanto Centro.

SEF:s styrelse

Ordförande: Karin Lindquist
tel. 0589-155 31

Sekreterare: Anita Lindblom
tel. 08-773 40 24

Kassör: Börje Andersson
tel. 122 05

Märtha Andreasson, Åke Rohdin,
Kersin Rohdin, Birger Viggen

Suppleanter:

Ingemar Nordin, Bertil Andreasson

La Espero

Organ för Svenska
Esperantoförbundet.

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.

Redaktion:

Karin Lindquist (huvudansvarig)
Västermovägen 19, 732 00 Arboga
tel. 0589 - 155 31

Ulf Ribers, Norra Freberga,
591 90 Motala, tel. 0141-220 35.

Bertil Danielsson (layout)

Årjäng, tel. 0573-105 69.

Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1985

Manuskript sändes en månad före
utgivningsdatum till

Karin Lindquist (adress se ovan).

Esperantoförlaget

Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept. - 15 maj:

onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras
hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

HODIAŬ

Från redaktionen

Esperantofrämjarnummer

Detta nummer av *La Espero* har tyvärr blivit något försenat. Det beror på att vi velat ha med rapporter om SEF:s årskongress i Helsingborg. Vi har försökt att göra ett fylligt reportage om alla dagarna för att ni som inte hade tillfälle vara där, ändå skall få information om vad som hände - alla beslut som togs, ändringar i styrelsen, föreläsningar m m.

Nästa nummer utkommer någon gång mellan den 1-15 september. Detta kommer att sändas till alla Esperantofrämjarna och skall innehålla information om Esperanto, huvudsakligen på svenska. Det blir också reportage om sommarens Esperanto-arrangemang och då naturligtvis huvudsakligen om världskongressen i Augsburg.

Utgivningsdatum för *La Espero* resten av året:

nr 6 1-15 september

nr 7 omkring 15 oktober

nr 8 omkring 30 november

Manuskript till tidningen skall vara redaktören tillhanda senast en månad före utgivningsdatum. Manuskripten skall vara maskinskrivna med dubbelt radavstånd, helst inga förkortningar. Bokstäverna skall vara rätt övertecknade. Manuskripten skall alltså vara av en sådan kvalitet att en icke-esperantist direkt skall kunna sätta materialet.

Annonspriser i *la Espero*:

1/1-sida	kronor 1.200
1/2-sida	725
1/4-sida	425
2 spalter x 6 cm	250

Redaktören

Ingemund Bengtsson på SEF-kongressen:

"Till dem som säger att Esperanto ju bara är en 100-årig dröm - ja visst, men drömmen om fred är tusenårig och inte överger vi den drömmen!"

INNEHÅLL/ENHAVO

- 52 Dusence varma
SEF-kongreso
- 53 Tomato "inaŭguris
fruktodonan.....
Karin nova prezidanto
- 54 Resultaträkning
- 55 Ingemund Bengtsson
inaŭguris en bela Esperanto
- 56 Esperanto sukcesis
kiel pontlingvo.....
- 57 ILEI:s internat.
konf. i Kungälv Bokrea...
Sök Ungdomsstipendier:
- 58 La vortaro estos
preta....
"Instruista" jar-kunvenis...
- 59 Dankon
Nekrologoj
Esperanta ĥorkantaro
Kongresaj eretoj..
La nova simbolo
- 60 Esperanto en radio
- 62 Ulf Ribers monkolertos
1.325 kr..
- 63 Esperantofrämjandet
SEF fördel. intakter
o. kostnader
- 64 Diversaĵoj

Prezidanto:

Ĉu vi permesas



Kiam Aino Åberg, la kunvokanto en la elektoprepara komitato, demandis min ĉu mi volas esti prezidanto en Sveda Esperantofederacio, mi sentis grandan heziton. Sed iom post iom mi alkutimiĝis je la penso gvidi tiom grandan kaj gravan federacion. Kaj tio dependas de la scipovo de la kapablecoj de la ceteraj estraranoj kaj la sento ke ĉiu esperantisto volas fari sian plej eble bonan por Esperanto, speciale nun antaŭ la 100-jara jubileo.

Konstruante komitatojn kaj projektgrupojn kun specialaj taskoj ĉirkaŭ la estraro oni ja povas malpezigi la laboron por la eta estrara grupo. Ni do bezonas personojn al specialaj projektoj – reklamo, traduko, "pura" manlaboro en Esperantocentro k t p. Se VI havas ideojn kaj/aŭ povas

doni helpon bonvolu kontakti iun en la estraro. Ni havos estrarkunsidon en Stokholmo la 15-an de junio. Kaj tiam ni inter alie decidus pri la labordivido de la estraranoj kaj la starigo de komitatoj.

Estas grave – legu necese – ke ni nun kun ĉiuj rimedoj aŭdigos nin. La celo de Esperanto estas tute klara kaj preciza – Esperanto ĉies dua lingvo. Sed por atingi tion celon ĉiu esperantisto devas kontribui, ĉiu laŭ sia scipovo.

Mi volas citi kejkajn vortojn kiun ABF-prezidanto Gösta Hultin diris en Helsingborg:

"Ne detenu vin ĝeni homoj kiam vi laboras por via grava ideo. Ne ĉiam humile petu sed laŭ postulu".

Karin Lindquist

Dusence varma SEF-kongreso

122 svedaj, polaj, germanaj, nederlandaj, bulgaraj, francaj kaj koreaj esperantistoj ĝuis vetervarman kaj korvarman 79:an svedan Esperantokongreson en Helsingborg.

Multaj el la svedoj venis el "samojedaj" regionoj, kie ankoraŭ ne estis eĉ unu verda folio sur la arboj. Des pli agrabla estis la surprizo kiam Skanio renkontis ilin kun tute somera verdaĵo kaj somera varmeco. La parkriĉa Helsingborg brilis per tiuj helverdaj koloroj, kiuj povas nur tiu fabela jarsezono doni. Kaj super tiu ĉi mirakla verdaĵo flirtis grandega verda esperantista flago surpinte de la alta popola domo, nia kongresejo. Do ĉio en bona ordo...

...jes, ĉio vere en bona ordo! Pri tio respondecis proksimume 10-kapa laborteamo en la aranĝanta Helsingborga klubo. Plej bone estus ne diri nomojn – "nomina sunt odiosa" konstatas nia "patrinlingvo" latino – sed ne estas eble eviti laŭdi la laborkapablecon precipe de la kvaropo Inga Magnusson, Erik Bengtsson, Clas Svensson kaj Kjell Randehed.

Vere enhavoriĉaj estas la kvar kongrestagoj 16-19 majo. Ni ekhavis novan federacian prezidanton, Karin Lindquist. En belsona Esperanto inaŭgur-paroladis la prezidanto de la sveda parlamento, Ingemund Bengtsson. nederlanda eminentulo de komputoroj,

Jan Otto de Kat, montris al ni novajn senfinajn vojojn al sukceso por nia lingvo. Pola duopo ludis neforgeseblan teatraĵon, iaforman mirindan pacpredikon.

La sola nuboj sur nia ĉielo estis la konstato en la jarraporto ke nia membraro dum la jaro iom malpliiĝis. Sed tio estu instigo al novaj klopodoj! Bona komenco estis ke la partoprenantaro en Helsingborg per 19 altigis la partoprenantaron en Skövde en 1984. Kvankam la skribanto de tiuj ĉi vortoj estas skövdeano, li tamen ĝojas pri tiu fakto...

Sur aliaj paĝoj de tiu ĉi numero de la Espero vi legos 4-personan reporton pri la kongreso.

Börje Andersson

jaŭdo

Tiel ni faras!

La jarkongreso en Helsingborg komenciĝis jaŭde la 16-an de majo posttagmeze. La unua programpunkto estis "Tiel ni faras. La Klubrepresentantoj diskutas." Estis intereso aŭdi kiel aliaj kluboj solvis siajn problemojn aŭ malsukcesis en iu laboro. En la raportoj mi elektas kelkajn erojn.

Norrköping

Devas esti persona kontakto por konvinki homojn. Reklamo amase ne estas utila. Kontakto kun la tria mondo. Ni havas la monon – ili havas la entuziasmon.

Skövde

Provis starigi kontakton kun aliaj organizoj sed ne atingis bonan rezulton. Partoprenis en "paca se-

majno" en lernejoj. Informis kaj informas dum "certaj tagoj" en la urbo ekz. merkato. La jarkongreso de SEF lastjare bedaŭrinde ne bone influis al la loka laboro ĉar aŭtune kiam la studlaboro komenciĝis neniu memoris la printempan eventon.

Kalmar

La plej superaj klasoj en la gimnazio havis kulturen tagon kaj tiam petis pri sciigoj pri Esperanto. 32 venis al trihora informo.

Hallsberg

Kunsidoj kelkfoje en Hallsberg kelkfoje en Östansjö. Infangrupo en Östansjö pere de ludado lernas Esperanton. Estas grave rakonti por homoj pri personaj travivaĵoj

dank al Esperanto. Oni ne devas havi grupon por instrui sed ankaŭ zorgi pri unuopaj intereso-

Sundsvall

Gejunuloj prizorgas programfolion por la klubo.

Kungälv – Göteborg

Kunlaboro kun la UN-organizo. Lennart Åberg aranĝas belajn ekspoziciojn en bibliotekoj kaj aliaj publikaj ejoj. Aranĝas dum la vintro Esperantosemajnon, tiun ĉi jaron kun Elfriede Kruse, kun prelegoj en diversaj kluboj, artikoloj en la gazetaro kaj informo en la lernejoj.



Tomato "inaŭguris" fruktodonan jarkunvenon

Sabato

- Karin nova prezidanto

Preskaŭ la tuta kongresanaro kolektiĝis en la granda salono de la Popola domo por sabate "federacie jarkunsidi". La senditaj atestoj montris ke 21 de ili estis voĉdonrajtaj delegitoj de kluboj kaj regionoj.

Pri voĉdono tamen neniam estis demando dum la tuta jarkunsido. Ĉio iris glate pro bona preparo, precipe dank al la elekta komitato kaj la enhavoriĉa jarraporto.

Sed kiam Roland Lindblom malfermis la kunvenon, li subite antaŭ si sur la podio malkovris tomaton... Ridetante li montris ĝin, ŝercante pri la ordinaraj agoj pri tiaj fruktoj flanke de publiko. Nun la sola tomato de la salono jam pace kuŝis antaŭ la prezidanto, kaj ne estis kauzo vidi aliajn flugante tra la ĉambro en la direkto al la podio... "Fruktodona" en alia maniero espereble la kunveno estis.

Salutoj el eksterlando

Linnea Edsenius estis elektita prezidanto de la kunsido kaj per bona rutino plenumis tiun taskon, helpita ĉe sia flanko de Bertil Wennergren kiel sekretario.

Salutojn al la kongreso sendis la ĝenerala sekretario de UEA, Flora Szabo Felsöy, kaj Norvega Esperantista Ligo.

1.398 Membroj

El la enhavoriĉa jarraporto ni povas raporti kelkajn plej gravajn punktojn:

- La membraro malpliigis ĝis 1398 membroj de kiuj 87 estis sub 26 jaroj. Ĉefe ni perdis membrojn de malviglaj kluboj kiuj ne plu vivas sed bedaŭrinde ankaŭ junaj membroj.

- Nova klubo fondiĝis en Vilhelmina. Ne plu ekzistas kluboj en Kiruna, Kramfors kaj Strängnäs.

- SEF dum la jaro aranĝis turneojn tra la lando por du eksterlandaj prelegantoj kun tre bona gazetara eĥo. Aliaj aranĝoj estis pol-sveda renkontiĝo, kurso pri informa tekniko kaj partopreno en la foiro "Virinoj kapablas". La jarkongreso en Skövde estis enhavoriĉa kaj donis bonajn eblecojn propagandi en la regiono.

- La prezidanto de la parlamento, Ingemund Bengtsson, eluzis ĉiujn eblecojn propagandi

por Esperanto. Interalie li faris tiun en la TV-programo "Bonan matenon Svedio".

Karin Lindquist nova prezidanto

Roland Lindblom volis ekŝigi kiel prezidanto por havi plu da tempo kiel UEA-estrarano. Kiel novan prezidanton la elekta komitato proponis Karin Lindquist, nia ĝisnuna kasisto kaj Espero-redaktoro. Unuanime ŝi estis elektata prezidanto, forlasas pro tio la kasiestan postenon sed konservas la redaktoran.

Ankaŭ Niklas Gustafsson petis ekŝigon kaj estis anstataŭata de la ĝisnuna anstataŭanto Åke Rohdin, Örebro. Nova membro de la estraro (kaj post estrara konstituiĝo kasisto) estas elektita Börje Andersson, Skövde. Relektita estis Kerstin Rohdin, Örebro. Restas automate en la estraro por nova mandatperiodo Märtha Andreasson, (vicprezidanto), Anita Lindblom (sekretario) kaj Birger Viggen.

Bertil Andreasson, Höör, estis elektita nova anstataŭanto de la

Malmö

Aranĝis plurajn ekspoziciojn i.a. en Skania foiro.

Höör

Grupoj en Hörby havis kelkajn studhorojn en Esperanto en la kadro de liberaj aktivecoj en la lernejo.

Uppsala

Laboras inter la gejunuloj.

Örebro

Estus pli bone demandi Kion ni faru? anstataŭ Kion ni faris?

Ofte ni bone povas rakonti Kio estas Esperanto kaj Kia ĝi estas sed por konvinki homojn lerni la lingvon ni plu multe devas klarigi Kial Esperanto estas bona solvo de la lingva problemo.

Falköping:

Sendis 50 radioprogramojn per la proksimradio. Nun komensiĝis kurso kvinminutajn ĉiutage

Suda Distrikto

Aranĝas semajnfinajn kursojn kaj seminariojn pri Esperanta literaturo kaj historio.

TEDU-regiono.

Seminarioj pri okcidenta Germanio. Seminarioj pri literaturo kaj arto paralele kun lingvistudoj. En Hällefors nova klubo kiu kunlaboras kun la UN-federacio. TEDU-folio informas pri aranĝoj en la regiono.

Inrterkona vespero kun muziko, manĝaĵo kaj amika babilado estis la lasta punkto la unuan tagon.

Lisbet Andreasson



La nova estraro de SEF: (de maldekstre) Anita Lindblom, Kerstin Rohdin, Ingemar Nordin, Bertil Andreasson, Märtha Andreasson, Börje Andersson, Birger Viggen, Karin Lindquist, Åke Rohdin kaj la ekspresidanto Roland Lindblom.

RESULTATRÄKNING



estraro. Restas anstataŭanto Ingemar Nordin. Revizoroj: Åke Blomberg, Bertil Bengtsson. Elektoprepara komisiono: Aino Åberg, Lisbeth Andreasson, Roland Lindblom. SEF-representantoj en Sveda Esperanto Instituto: Karin Lindquist kaj Åke Rohdin.

Bela pluso: 27 550 kronoj

La revizora raporto montris pluson de 27 550 kronoj, do bela bonhavo sed necesa por la 100-jubileaj agadoj.

Tri nova honoraj membroj

Sep proponoj estis traktitaj, el kiuj la klubo en Motala prezentis ses. Pri la proponaj sortoj ni raportas aparte. Same ni faros pri bona iniciato de Ulf Ribers kaj kelkaj aliaj jarkunvenaj eroj.

Tri novaj honoraj membroj estis elektitaj: Sven Alexandersson, diligenta dejoranto en Esperanto Centro, Bertil Åkerberg, same laborema adresanto de La Espero, kaj Ragnar Hjorth, distribuanto de novaj libroj.

Fine Märtha Andreasson en la nomo de la federacio per floroj, librodono kaj varmaj vortoj dankis la eksantan prezidanton Roland Lindblom, kaj la jarkunveno tradicie finis per la himno.

Börje

INTAKTER	1984	1983
Medlemsavgifter	68.990:00	68.629:00
KLubo Cent, Klubo 100 jaroj	12.675:00	2.810:00
Gävor	15.070:78	30.188:70
Räntor	13.686:17	15.978:89
La Espero	6.858:90	10.087:66
Tryckeriet	5.124:15	--
Informationsmaterial	4.360:50	4.343:00
Insamling lön	8.900:00	7.150:00
Diverse intäkter	15.861:34	50.866:80
Bidrag Arbetsmarknadsverket	22.376:00	16.238:00
SEF-kongress	6.572:95	--
Tidskriftsstöd	9.000:00	--
	189.475:79	206.292:05

KOSTNADER

La Espero	56.739:53	58.624:46
Lokalkostnader	33.351:15	36.632:50
Verksamhetskostnader	17.554:45	18.017:81
Avskrivningar	5.229:00	7.696:00
Informationsverksamhet	17.492:96	40.738:55
Medlemsavgifter	4.681:00	4.103:80
Löner och sociala kostnader	26.877:30	36.858:35
Överskott	27.550:40	3.620:58
	189.475:79	206.292:05

BALANSRÄKNING PER DEN 31 DECEMBER 1984

TILLGANGAR

Kassa	291:50
Postgiro	68.191:01
Bank	133.241:19
Inventarier	1.827:15
Värdepapper	8.080:70
Kunder	24.043:50
	235.675:05

SKULDER

Diverse Personer	28.564:19
Medlemsavgifter 1985	2.715:00
Leverantörer	16.787:70
Personalens skatter	4.974:00
Eget kapital	182.634:16
	235.675:05

Roland Lindblom
Roland Lindblom
Ordförande

Åke Blomberg
Åke Blomberg
Revisor

Karin Lindquist
Karin Lindquist
Kassör

Bertil Bengtsson
Bertil Bengtsson
Revisor

Ingemund Bengtsson inaŭguris en bela Esperanto

Vendrede la tago komenciĝis per aŭtobusa rondveturado en la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj.

La ekskurso finiĝis per vizito en la Maria preĝejo, kie ankaŭ estas aranĝita mallonga diservo.

Poste sekvis kelkaj liberaj horoj por ripozo, promenado kaj babilado. Aŭ oni povis aĉeti librojn en la librostando aŭ skribi salutojn al geamikoj por havi sur la koverto la belan poŝtŝtampon, speciale eldonita por la jarkongreso. Pri la speciala poŝtŝtampo ni devas mencii ke aperigis dank' al Curt Lindström, Stokholmo, kiu donacis grandan sumon por ebligiti.

Je la 14a posttagmeze okazis tre grava kunsido, kiun gvidis Karin Lindquist kaj Birger Viggen. Temas pri "La 100-jara jubileo — kiel ni preparos nin".

Birger Viggen prezentis la ideon pri "Esperantoframjandet". Bela broŝuro estas presita kaj jam donis kelkajn anojn al la grupo "Esperanto-apogantoj". La kluboj mendis sufiĉe multajn broŝurojn kaj espereble, li diris, tio donos baldaŭ rezulton. Samtempe tio donos monon al la Asocio, mono bezonata por la laboro pri la 100-jara jubileo.

Birger Viggen ankaŭ prezentis la libron pri Esperanto en sveda lingvo, kiu estas en preparo. Diversaj personoj skribas pri Esperanto el multaj aspektoj, i.a. el lingvosciencia, literatura, historia vidpunktoj. La libro estos preta al la jubilea jaro 1987.

Karin Lindquist prezentis specialan informpakadon kiun pretigis kaj plu preparas la grupo por informado kaj reklamo de SEF. La informadon ni ĉiuj devos intensigi dum la venontaj du jaroj kaj kiel helpo ni havos afiŝojn, broŝurojn, prelegproponojn, dia-

bildseriojn kaj aliajn informilojn kaj reklamilojn. Oni en la kluboj uzos ilin dum informado ekz en lernejoj kaj aliaj societoj, en ekspozicioj kaj en foiroj. Oni planas kursojn pri informado kaj reklamo kaj ankaŭ estos specialaj artikoloj sendotaj al la gazetaro kaj aliaj amaskomunikiloj.

Post la prezentado de la materialo sekvis gruplaboroj. Estas 10 diversaj grupoj, kiuj pli profunde studis la materialon kaj donis sian opinion pri la prezentitaj ideoj kaj reklamiloj/informiloj.

La informa grupo faris admirindan laboron kaj espereble la kluboj multe uzos la materialon.

Gazetara konferenco allogis ĵurnalistojn el Helsingborgs Dagblad kaj Arbetet. La ĉeesto de la prezidanto de la sveda parlamento kompreneble vekis grandan intereson kaj kaŭzis multajn demandojn. Nia eksterlanda gasto Jan Otto de Kat ankaŭ vekis intereson kiam li montris siajn komputilajn listojn pri sia laboro per komputilo prui ke esperanto povas servi kiel pontolingvo en tradukado inter aliaj lingvoj.

La solena inaŭguro komencis je la 17a per muziko. Poste bonvensalutis nin la prezidantino de la klubo en Helsingburgo, Inga Magnusson, al la urbo kaj la prezidanto de la Sveda Esperantofederacio Roland Lindblom salutis en la nomo de la Federacio.

Stig Blixt, prezidanto de komunuma estraro salutis la ĉeestantojn bonvenaj al la urbo, rakontis pri ĝi kaj esperis ke la vizito en la urbo estus agrabla.

Inter la speciale invitatitaj gastoj estis ankaŭ la prezidanto de la Sveda Parlamento, Ingemund Bengtsson, kiu jam en sia junaĝo komencis lerni Esperanton en ABF-kurso. Li faris la solenan pa-

roladon dum la inaŭguro kaj li faris ĝin en esperanto je granda plezuro de la ĉeestantoj.

En sia parolado Ingemund Bengtsson i.a. diris, ke lia intereso por Esperanto ekrevekigis en 1980, kiam li partoprenis la UEA-kongreson en Stokholmo. Tiam li fariĝis konscia pri kiel bonege la lingvon funkcias en internaciaj rondoj. Li ankaŭ ĝojis pri la eblecoj al kontaktoj kun esperantistoj kaj en Stokholmo kaj aliloke la lingvo donis al li. La kongreso en Stokholmo sen interpretistoj pruvis al li ke la lingvo estas vere taŭga kiel interkomunikilo.

Kaj, li daŭrigis, kiam homoj nun opinias, ke Esperanto ne fariĝis la internacia lingvo pri kiu revis Zamenhof kaj aliaj, ke ĝi fiaskis, li respondas, ke homoj dum jarmiloj revis pri paco, ŝajne sen rezulto, kaj ankoraŭ la revo estas aktuala. Esperanto estas nur 100-jara kaj la revo pri komuna lingvo, same kiel la revo pri paco, neniam estos neaktuala.

Tria gasto estis Gösta Hübinette, prezidanto de ABF en la regiono. Li tre sprite parolis pri la kunlaboro inter ABF kaj la esperantoklubo. I.a. li opiniis ke la esperantistoj estas tro humilaj kaj nepostulemaj. Li ankaŭ dankis al Ingemund Bengtsson, ke li povis ĉeesti.

La teatraĵo temis pri renkontiĝo inter usona kaj japana soldatoj en la ĝangalo dum la milito kaj i.a. la problemoj pri ne samlingveco. La pola grupo elektis tiun teatraĵon parte pro tiu kaŭzo; la malfacileco komprenigi sin kiam oni parolas malsamajn lingvojn — kiuj miskomprenoj ekestas kiam ne eblas paroli.

Märtha Andreasson

Esperanto sukcesis kiel pontlingvo por komputiloj

“La komputiloj donas al la Esperanto-movado novan esperon”.

Jen tekstas granda rubriko en Helsingborgs Dagblad dum la SEF-kongreso. La kaŭzo de tiu artikolo estis la prelego de Jan Otto de Kat, konsulto en la nederlanda entrepreno Pan-Consult BV.

La preleganto komencis per historia skizo de la komputiloj. Rimarkeble estas ke jam en 1840 la unua komputilo estis fabrikata – por astronomia observado dum ŝipveturado. la sama eltrovinto en 1850 fabrikis la unuan vere modernan komputilon. Sed kelkajn jarojn poste tiu profesoro mortis, kaj la tuto estis forgesita.

Nun daŭris ĝis 1940, kiam la elektroniko ebligis la modernan epokon de la komputila historio. Kaj tuj la evoluo kiel konate estas rapidega.

Kiam la nederlanda registraro volis evoluigi komputilan sistemon en la intenco gardi la landon kontraŭ la ĉiam minacanta tro alta akvonivelo ĉe la marbordoj, la preleganto estis envolvita.

Aliaj lingvoj konfuzigas la komputilon

Dum la lastaj jaroj li intersiĝis pri la eluzo de komputiloj dum lingva tradukado. Interalie EG (la komuna Europa merkato) volvas provi ĉu komputila tradukado povas solvi la terurajn lingvajn problemojn de tiu organizo.

La komputilo bezonas unu frontlingvon. Poste programado estas poste facile helpe de la komputilo havi ĉiujn aliajn bezonatajn lingvojn. Jen estas la granda ebleco por Esperanto. Jan Otto de Kat per propra inicato provis Esperanto kiel pontlingvo. Tuj li trovis ke ĝi estas eksterordinarie

taŭga por tiu celo. La aliaj lingvoj multe pli konfuzigas la komputilon.

Lia nederlanda firmao jam multe pagis por la evoluado de la lingvosistemo. Daŭre li nun provas evoluigi pli teknikan sistemon. Sed la tutan tempon Esperanto “fidas” lin kiel bonega pontlingvo. Ekzemple montriĝis ke la angla traduko aperas kun nedefinitaj artikoloj kvankam Esperanto ja ne havas tiun!

Antaŭjuĝoj pri Esperanto forpasas

La prelega publiko en Helsingborg estis videble ravita pri la sciigoj. Multaj estis la demandoj post la prelego. Dum tiu “demanda kvaronhoro” Jan Otto de Kat kaptis la eblecon doni novajn interesajn sciigojn:

– La sistemo de la komputilo estas “lernanta”. La komputilo la tutan tempon lernas novaĵojn. Kontraste al la homo ĝi nenion forgasas.

– Kiel estas konate por ĉiuj esperantistoj multaj homoj ofte dubas ke oni povas esprimi ĉion per Esperanto. Sed per la nomita komputila sistemo oni vere pravas ke oni povas..

– “La komputila mondo” nun tiel rapide evoluigas ke oni apenaŭ povas vidi limojn de ĝia eblecoj. Post 10 jaroj oni supozeble povas stari en Nederlando telefonante kun Svedio en nederlanda lingvo – kaj la parolricevanta svedo aŭdas tuj en sia telefono svedan tradukon!

Por esti kapabla uzi la novan komputilan tradukan sistemon multaj homoj jam nun volas lerni Esperanto. Por la estonteco la eblecoj por Esperanto estas pli kaj pli grandaj.



Jan Otto de Kat prelegis pri la eblecoj de la komputilo.

“Med Esperanto i Helsingborg”

Alla kongressdeltagarna i Helsingborg fick en bok med ovanstående titel, författad av Sven Möllestad, mångårig och uppskattad medlem i Helsingborg-klubben. Boken har utgivits med anknytning till internationella språkets år 1987.

– I den kan man läsa om att Esperanto-rörelsens historia i Helsingborg verkligen har anor. 1892 utkom här den första svenska läroboken i Esperanto, publicerad av G H Backman. Sven Möllestad berättar också om Dr Zamenhofs besök i Helsingborg 1908 och vilket starkt intryck på pressen en intervju med honom hade gjort.

Red.

Börje Andersson

ILEI:s Internationella Konferens i Kungälv 22-29 juli 1985



Anmälningar har kommit från såväl utlandet som från Sverige. Men har du anmält dig än? Detta är ett utmärkt tillfälle att delta i ett internationellt arrangemang på hemmaplan. Det är inte speciellt dyrt heller. 1 700 kronor för en hel veckas kost och logi med konferensavgiften inräknad.

Bor du i Göteborgs-området och avser att bo hemma kan priset reduceras. Har du inte tillfälle att vara med hela tiden kan kostnaden också minskas. Man betalar bara för vad man får. Man behöver inte heller vara lärare för att vara med. Alla är välkomna. Programmet är varierat och handlar om mycket mer än skola och undervisning. Vi räknar med intressanta föredrag av framstående esperantister; arbetsgrupper; diskussioner, div. underhållning, samkväm, sång, musik, utfärd i skärgården (den kostar lite extra)

och trevlig samvaro. Nybörjarkurs anordnas, så man behöver inte tveka att anmäla sig för att man tycker att man kan för lite Esperanto. Ta förresten med familjemedlemmar och bekanta. De har chansen att se hur Esperanto fungerar och att lära sig språket. Har du utländska bekanta så informera dem eller hjälp dem eventuellt att komma hit.

Nordiska Folkhögskolan i Kungälv är verkligen en bra plats att vara på. Den är vackert belägen, har modern bostäder, god mat och trevlig personal. Hör av Dig, än finns det plats till många fler. Det dröjer kanske innan vi får ett internationellt arrangemang i Sverige på nytt. Upplysningar och anmälningsblanketter kan du få av Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 00 Hörby. Tel. 0415-501 52.

Sök ungdomsstipendier:

Med anledning av att FN utsett 1985 till INTERNATIONELLA UNGDOMSÅRET bestämde årskongressdeltagarna i Helsingborg på förslag av Ulf Ribers att insamla pengar under kongressdagarna till ett eller två resestipendier. Denna insamling gav kr 1 325. Resestipendiet skall utdelas till en eller två ungdomar för deltagande i ungdomssammanskomst (läger, kongress, kurs eller liknande) för esperantister inom Europa. För att erhålla stipendiet gäller följande:

1. Sökande skall ha fyllt minst 16 och högst 20 år under 1985.
2. Sökande skall i tal eller skrift visa sig förstå eller uttrycka sig i enkla meningar på Esperanto.
3. Sökande skall vara medlem hos någon esperantoklubb eller annan esperantoorganisation.
4. Sökande skall efter att ha deltagit i ovannämnda ungdomssammanskomst lämna muntlig eller skriftlig redogörelse för sitt deltagande.
5. Sökande skall själv föreslå passande ungdomssammanskomst och meddela vilken summa som behövs för ändamålet.

Ansökan sändes till Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga snarast och senast 1985 09 01. Representanter för SEF, SEJU och Motala Esperantoklubb kommer att utse stipendiaten/-erna.

BOKREA...

Författare	Titel	förr kr	nu kr
TZAUT	Karnavaletto, kassett	80	60
HEGELER 1 o 2	ABC de amo	110	82
JUNG. T	Ĉiu-Ĉiun	157	118
ZAMENHOV, M			
o L	Proverboj	190	143
DE SMET, WMA	La Cetacoj	85	64
CHIUSSI, I	Je la flanko de la profeto	109	80
DARBELLY, C	Kiu estas kiu en la scienco kaj tekniko	115	86
	Moderna kroata prozo	182	137
CAMÔES	La Lucidoj	145	109
GIORGI, A De	Pretertempe (poemoj)	70	52
KALOCSAY, K	Tutmonda sonoro I-II	258	193
	Pezi elefanton (bildlibro)	33	24
HORATH-DARGAY	Tom Sawier (bildstriaĵo)	21	16

Dimanĉo

La vortaro estos preta al la jubilea jaro!

Post tritaga kongresado oni povus imagi, ke la plej multaj kongresanoj jam laciĝis, kiam la Eldona Societo Esperanto (ESE) invitis al sia jarkunsido en la frua dimanĉa mateno. Tion eble ankaŭ la estraror de ESE supozis, ĉar malgraŭ ke ili presigis ordinaran nombron de la tagordo, ĝi nur sufiĉus por la duono de la partoprenantoj. En bona konkordo tamen du personoj povis sekvi la kunsidon, legintaj la saman papeiron. Ke tio bone funkciis oni povis konstati de la vigla kaj interesa debato dum la kunsido, kiu estis lerte gvidata de Åke Blomberg el Lidköping kun Inger Hultqvist el Stockholm kiel sekretario. La jarraporto kaj la ekonomia raporto estis akceptitaj kaj la estraro sensarĝigita en bona ordo kaj bona signo de la membrara dankemo kaj konfido estas, ke la estraranoj

Åke Blomberg kaj Bertil Nilsson, kies mandatoj estis finitaj, estis reelektitaj. Kiel nova anstataŭanto post Linnea Edsenius, kiu ne deziris reelekton, Per-Arne Fritzon estis elektita. La prezidanto de ESE Anita Lindblom informis pri la laboro por pretigi la Sved-Esperantan Vortaron. La granda espero kaj ĉefa celo nun estas, ke la Vortaro estos preta kaj aĉetebla en la jubilea jaro 1987. El Göteborg oni esprimis la deziron, ke ESE havu librovendeton tie, same kiel en Malmö kaj Stockholm. La estraro promesis esplori la eblecojn trovi taŭgan ejon kaj personon, kiu povos prizorgi tian agadon.

Post la jarkunsido de ESE ni estis pretaj por fermi la jarkongreson. La reprezentanto de la klubo en Örebro Erling Sundgren bonvenigis la kongresanojn al lia ur-

bo por la jarkongreso 1986, kiu estos aranĝata sub la moto "de esperantistoj, por esperantistoj kaj kun esperantistoj".

Fine la vicprezidanto Märta Andreasson esprimis tre varman dankon al la klubanoj en Helsingborg, kiuj faris grandegan kaj mirinde bonan laboron por aranĝi la kongreson. La sindonaj streĉoj de la komitatanoj konsiderinde malfaltigis la kostojn por la kongresanoj kaj kiel simbolo de ilia dankemo kaj kiel memoraĵo por la klubo en Helsingborg Märta Andreasson transdonis al la loka prezidanto Inga Magnusson valoran libron. Post la solena fermo kaj multaj adiaŭaj kisoj kun esperplenaj "Ĝis revido!" la kongresanoj disiĝis por veturi hejmen en la plej bela antaŭsomera Svedio, kiu estas imagebla.

Linnea Edsenius

"Instruista" jarkunvenis en Helsingborg

La Sveda Sekcio de I.L.E.I. jarkunvenis sabate la 18-an de majo en Helsingborg. La jarkunsido estis multe vizitata de membroj. Laŭ la jarraporto la sekcio dum la jaro havis 47 membrojn. Dum la jaro membroj instruis Esperanton en la lernejo kaj kiel temo de liberaj agemoj kaj kiel libervola kurso. Pluraj membroj dum la jaro laboris kiel kursgvidantoj. Kelkaj membroj informis en eksteresperantistaj asocioj pri Esperanto.

La jarraporto kaj la kasa raporto estis akceptataj kaj la jarkunsido donis malŝarĝon al la estraro.

La estraro estis reelektata: Bertil Andreasson, prez. Ingemar Nordin, Ingrid Ottosson, Lars-Börje Nilsson kaj Jan-Olof Ahlbeck. Finfine ĉiuj membroorganizoj samopiniis pri la statuto de la Sveda Esperanto-Instituto. La jarkunsido elektis Bertil Andreasson kaj Ingemar Nordin kiel ILEI-representantoj ĉe la instituta jarkunveno. La ĉeestantoj diskutis la 19-an Internacian Konferencon de ILEI en Kungälv ĉismere kaj rekomendis la membrojn kaj aliajn esperantistojn aliĝi tuj al tiu aranĝo.

Bertil Andreasson



©JOMO

70a Universala
Kongreso de
Esperanto



Augsburg: 3.-10. 8. 1985
2000 jara urbo

Ĉu vi konas
Transpiranton
— la plej disvastigitan mondlingvon en la Verdurbeto?
Studu ĝin kaj aliajn novaĵojn en
Grönköpings veckoblad
Nur 86:— unujare.
Skribu al GV, Box 2080,
103 12 Stokholmo, aŭ telefonu 08-789 30 55!



Koran dankon pro viaj malavaraj donacoj al diversaj kolektadoj:

Klubo cent

Sune W. Ahlm, Vänersborg
Tore Johansson, Kalmar
Signhild Johansson, Kalmar
Malte Smith, Kävlinge.

Donacoj

Markaryds Astma och Allergiförening

Nekrologoj

Forpasis du membroj de Klubo Esperantista de Trelleborg.

Karl Nilsson mortis la 19-an de februaro 1985.

John Trulsson mortis la 9-an de marto 1985.

Ambaŭ estis dum multaj jaroj membroj de la klubo kaj kun granda intereso partoprenis en klubbkunvenoj kaj studrondoj.

Viktor Bonde, Falun mortis.

Unu el la plej malnovaj esperantistoj mortis la 6-an de aprilo. Li naskiĝis 1892, esperantiĝis aŭtune 1916 kaj membriĝis en SEF 1917 samtempe kiel en la Faluna klubo. Delegito en UEA li estis inter la jaroj 1918 kaj 1982. Al SAT li apartenis kun la membronumero 19 pri kio li fakte fieris.

Finfine: Esperanta ĥorkantaro

Ofte kantistoj en Esperantujo demandis pri esperanto-kantoj por ĥoroj. Por plenigi tiun truon Motala Esperantoklubb eldonis kajeron kun kantoj metitaj por ĥorkanto.

Estas en oportuna momento tio estas farata. 100-jara jubileo en 1987 proksimiĝas, kaj la intereso por kantĥoroj en la tuta mondo pliigiĝas. Nur en Svedio estas nun 50.000 kantĥoroj, kiujn la svedaj esperantistoj nun pli bone povas interesigi. Multaj ĥoroj kolektiĝas ĉiun semajnon, kaj se oni informas la kantistojn pri la lingvo kaj precipe pri la elparolo, estus bonaj eblecoj ke ili provas unue ian simplan kanton, opinias Ulf Ribers en Motala Esperantoklubb. Oni eble eĉ povus membriĝi kantistojn al la esperantaj kluboj, kiuj ofte malhavas bonajn kantgvidantojn.

La kajero enhavas kaj esperantajn kantojn kiel "Al Zamenhof" kaj kontajn svedajn ĥorkantojn. Runo Stridell esperantigis la plej multajn.

Börje Andersson

Kongresaj eretoj...

Tre agrabla estis la sabata vespero de la SEF-kongreso kun supeo, muziko, danco kaj filmprezentado, ĉio en la granda salono de la kongresejo, la Popola Domo.

La supeo estis tia kia povas esti nur en Skanio – "moe mad, go mad, mad i rättan ti å mada-ro". Gaja estis la etozo ĉirkaŭ la tabloj.

Per kaj "taffel-muziko" kaj dancmuziko respondecis duopa orkestro, do malgranda sed despli laŭdinda. La filmprezentadon donis al ni nia nova membro el Sudkoreujo, ĉarma Boo Mee Kim, ĵus edziniĝinta kun Roland Lindblom. Kompreneble la filmo traktis ŝian hejmlandon. Same ĉarma filmo kiel la prezentanto... precipe ni ĝuis la erojn pri korea kamparana vivo.

Faka kunsido estis nur unu, tiu de la instruistoj, raportita aliloke de Bertil Andreasson.


Sed sabato havis ankaŭ spacon por regionaj kunsidoj. Se ĉiuj estis same viglaj kiel la okcidenta, kiun la subskribinto partoprenis estas vera signo pri vicleco en nia movado. Cetere sin "movadis" inter ĉiuj regionaj kunsidoj Kerstin Rohdin kaj Ingemar Nordin, donante informojn, utilaj por la estonteco.

Kaj Helsingborgs Dagblad kaj la lokaj paĝoj de Arbetet havis grandajn artikolojn pri la kongreso. Ankaŭ raportis aliaj gazetoj pere de TT, kaj la loka Radio Skanio havis programon.

Nia nederlanda gasto Jan de Kat havas nomon, kiu estas malfacila por svedaj oreloj, tiun ni rimarkis jam en la kongresa programo – "Jodekat". Sed la rekordon donis tiu gazeto kiu nomiĝas lin Dio van Holt! En Göteborg oni kutimas diri pri tiaj eraroj: "Ente en seffra rätt"...

Börj

La nova simbolo de Esperanto.




Esperanto en Radio

Stacio	Tempo UT x)	laŭ Frekvencoj je kilohercoj kHz (Ondlongoj je metroj)
Ĉiutage:		
Pekino	2000-2030 1) 2230-2300 2) 1100-1130 3) 1300-1330 4)	7470 (40.1), 9365 (32.0), 9965 (30.1) 9700 (30.9), 11445 (26.2) 9480 (31.6), 11600 (25.8) 11685 (25.6), 15385 (19.4)
Antenoj direktitaj al		
1) Eŭropo		
2) Latin-Ameriko		
3) Japanio, Koreio		
4) Sudorienta Azio		
Varsovio	0530-0600 1100-1125 1520-1655 1630-1655 1930-2000 2130-2155	1503 (200), 5995 (50.0), 6135 (48.9), 7270 (41.3) 7145 (42.0), 9525 (31.5) 7285 (41.2), 9675 (31.0) 6095 (49.2), 7285 (41.2) 6095 (49.2), 7285 (41.2) 1503 (200), 5995 (50.0), 6095 (49.2), 7285 (41.2)
Lunde:		
Berno (Eŭropa emisio)	1630-1645	3985 (75.3), 6165 (48.7), 9535 (31.5)
Merkrede:		
Berno Transkonti- nenta emisio)	0145-0200 0345-0400 0745-0800 1045-1100 1315-1330 1515-1530 1715-1730 2200-2215 2245-2300	6135 (48.9), 9725 (30.8), 9885 (30.3), 11925 (25.6), 12035 (24.9) 15305 (19.6), 15570 (19.3) 6135 (48.9), 9725 (30.8), 12035 (24.9), 15305 (19.6) 9560 (31.4), 15305 (19.6), 15570 (19.3), 17830 (16.8) 11795 (25.4), 15570 (19.3), 15585 (19.2), 17830 (16.8) 11955 (25.1), 15570 (19.3), 15585 (19.2), 17785 (16.9) 15430 (19.4), 17570 (17.1), 17830 (16.8), 21770 (16.8) 9885 (30.3), 11955 (25.1), 17570 (17.1), 17830 (16.8), 21770 (13.8) 9885 (30.3), 12035 (24.9), 15570 (19.3) 9885 (30.3), 12035 (24.9), 15570 (19.3)
Atentu! Grasaj frekvencaj ciferoj indikas plej fortan sendilon.		
Ĵaŭde:		
Vatikano	0500-0515	6250 (48.0), 7250 (41.4), 9625 (31.2), 11715 (25.6)
Berno (Eŭropa emisio)	1630-1645	kiel lunde
Sabate:		
Berno (Transkonti- nenta emisio)		kiel merkrede
Berno (Eŭropa emisio)	1630-1645	kiel lunde
Romo	1900-1920	7275 (41.2), 9710, 11800 (25.4)
Dimanĉe:		
Vieno	0534-0557 0945-0957	5945 (50.5), 6155 (48.7), 11665 (25.7) 6155 (48.7), 7170 (41.8)
Vatikano	1900-1915	6190 (48.5), 6250 (48.0), 7250 (41.4), 9645 (31.1)
Zagrebo	2145-2200	1145 (26.4)

ESPERANTO en RADIO

ATENTU! Ĉiuj tempindikoj estas laŭ UT (Universala Tempo, antaŭe GMT). Por Svedio validas MET (Mez-Eŭropa Tempo). Pro tio vi devas alkalkuli **unu horon** al UT: en periodo de somera tempo alkalkulu **du horojn**, ekz. 21h45 fariĝas 23h45.

Aŭskultu kaj skribu al **Esperanto-Redakcio(j)**de – Radio Polonia, Pk 46, PL-00-950 Warszawa 1 – Radio Pekino. **Beijing** – Svisa Radio Internacia, CH-3000 Bern 15 – Aŭstria Radio – ORF, Pf 700, A-1041 WIEN – Radio Vatikano, I-00120 Città del Vaticano, (Italio) – Radio Roma, Casella postale 320, I-00100 ROMA – Radio Zagreb, Juriševa 4, YU-41000 ZAGREB.



Sektoroj	Tempo
② & ③	01.45
③ & ④	03.45
⑤ & ⑥	07.45
⑤ & ⑥ & ⑦	10.45
⑥ & ⑦ & ⑧	13.15
⑧ & ⑨	15.15
⑧ & ⑨ & ⑩	17.15
⑧ & ⑨ & ⑩	22.00
① & ②	22.45

Kial aŭskulti?

Unue mi petas vin atenti ke en la periodo de la jaro, kiam validas "somera tempo" en Mez-Eŭropo, vi devas alkalkuli du horojn al Universala Tempo (pli frue tempo de GMT). En la radiotrafiko oni uzas kiel bazan tempindikon Universalan Tempon Koordinitan (UTC), en Esperanto sufiĉas UT.

Tre ĝojiga estas la fakto, ke Svisa Radio Internacia ek de 5a de majo 1985 grave pliampleksigis la disaŭdigojn en Esperanto. Pri programoj ĉefe destinitaj por eŭropaj aŭskultantoj ni povas

noti, ke tiuj emisioj nun okazas lunde, jaŭde kaj sabate je 1630-1645 UT (t.e. 1830-1845 laŭ somera tempo en nia lando). Sed krome vi povas aŭskulti Esperanton el Svislando ĉiun merkredon kaj sabaton eĉ **naŭfoje** daŭre de la diurno. Mi jam spertis, ke tiuj Transkontinentaj elsendoj estas tre bone, klare kaj sen perturboj aŭskulteblaj en nia lando. Ĉi tie en Gotenburgo mi konsta



Ulf Ribers monkolektis 1.325 kr por stipendio

El la sep proponoj al la SEF-kongreso n:ro 1 de Motala Esperantoklubb estis la plej rimarkinda. La kialo estas ke la Motala prezidanto, Ulf Ribers, post la nea estrara respondo al la propono pri junulara stipendio komencis monkolekton pri la stipendio...

... kaj la rezulto de tio estis la bela sumo de 1.325 kronoj! Ulf tuj transdonis al la novelektita estraro, kiu nun disponas ĝin.

La intenco de la stipendio estis ke junuloj povus utiligi ĝin por partopreno en junul-kampejoj aŭ similaj aranĝoj. La estraro opiniis ke estas pli bone uzi la monon por trakti ne-esperantistojn ol jam esperantigitajn. Multaj kluboj ankaŭ havas rimedojn por plezurigi novajn nembrojn.

Haldo Vedin kaj Ulf Ribers kritikis la respondon, dirante ke internaciaj renkontiĝoj multe signifas por sekurigi junulojn por la movado. Tamen la jarkunveno decidis laŭ la responde de la estraro — post kiam Ulf Ribers do respondis en sia propra, mondana maniero!

Skribu tuj al Sveda Poŝto!

Motala Esperantoklubb havis ankaŭ kvin aliajn proponojn:

— Novan modernigitan eldonon de sved-esperanta frazaro. Estrara respondo kaj jarkunvena decido estis ke kun la limigitaj rimedoj frazaro momente ni startas alte en la vico.

— SEF alvokas klubojn kaj unuopulojn pagi vojaĝojn kaj restadon de eksterlandaj junuloj en svedaj familioj aŭ junularaj kampejoj, precipe el nepagipovaj landoj. La estraro apogis la proponon kaj krome montris al la eblecoj, kiujn donas Pasporta Servo.

— Kursliteraturo por instruistoj. La estraro respondis ke ni jam havas almenaŭ du modernajn lernolibrojn. Ulf Ribers replikis ke ili estas por komencantoj sed ne por instruistoj. Bertil Andreasson substreki ke instruistoj ne bezonas specialan literaturon. Lennart Åberg proponis kursojn por kompetentaj instruistoj. Guy Coste tamen substreki la bezonon de libroj por instruistoj kiuj volas sin prepari. Roland Lindblom alvokis interesulojn skribi

artikolojn pri la temo en La Espero. Per tio la jarkunveno lasis sin kontentiĝi.

— Poŝtmarko pri Esperanto en 1987 kaj aliaj aktivajoj por tiu jubilea jaro. La estraro respondis ke ni jam havas komitaton pri tio. Jan ströme informis ke la Sveda Poŝto momente prokrastis ĝis aŭgusta kunsido la aferon pri poŝtmarko kaj alvokis al amasa skribado al "Generaldirektören, Postverket, Stockholm". Sed nur unu nomo sur ĉiu karto, ĉar estas la kartoj kiuj estas kalkulitaj, ne la nomoj!

— Pli bona informado pri Esperanto en bibliotekoj, turistoficejoj, stacidomoj ktp. Kerstin Rohdin informis pri nova klasifika sistemo en bibliotekoj, kiu pli bone favoras Esperanto-librojn.

Enketo en la kluboj

Lennart Åbert proponis enketon pri la stato de Sveda Esperanto-Movado per skriba enketado pri la interna stato de la kluboj. La estraro subtenis la ideon, kaj tion faris ankaŭ la jarkunveno.

Börje



tis, ke emisioj direktitaj al sektoroj 5, 6, 7 kaj 8 (vidu la mapon pri antenaj direktoj!) estas perfekte kapteblaj.

Nun, ankaŭ vi provu, ĉu ne? Ne nur la menciitajn emisiojn laŭ sektoroj 5-8, sed ankaŭ aliajn. Poste, vi skribu al Svisa Radio Internacia. Petu ankaŭ ilian programan tabelon en Esperanto.

Mi jam konstatis, ke SRI unu-du minutojn antaŭ la kom-


enciĝo de Esperanto-programoj por la mondo, merkrede kaj sabate, anoncas tiujn programojn ankaŭ en angla lingvo. Je ekzakte samaj horoj kiel tiuj de Esperanto, oni sendas programojn en la lingvo romanĉa, la kvara lingvo de Svislando, marde kaj vendrede, kaj muzikajn kvaron-horojn lunde kaj ĵaŭde. Anoncante tiujn programojn, oni ĉiam ankaŭ mencias la esperantajn programojn.

La ĉiutagaj programoj de Radio Pekino kaj Radio Polonia brile gvidas la grupojn de Esperanto-

emisioj el la sep ŝtatoj, kies sendiloj kaj antenoj ebligas al ni tra la tuta semajno ekzerci Esperanton. Se vi volas atingi kapablon uzi Esperanton flue, vi nepre devas eluzi la bonŝancojn, kiujn prezentas "niaj" radiostacioj internaciaj. Aŭskultante vi trejnias vian kapablon senĝene kompreni parolatan Esperanton en normala paroltakto. Baldaŭ vi rimarkos, ke vi mem ankaŭ flue parolas la lingvon.


Kore salutas vin

Lennart Åberg




Svenska Esperantoförbundet

Proc fördeln av intäkter 1984



Proc fördeln av kostnader 1984



Esperantofrämjandet

På vidstående pelare kan ni se hur ställningen är. Vid månadsskiftet maj/juni hade vi cirka 70 "esperantofrämjarmedlemmar". Låt gärna pelaren stiga snabbare. Det gäller inte bara pengarna vi får in, utan viktigare är den information om Esperanto ni lämnar vid överlämnandet av den lilla broschyren och den information de får vid senare tillfälle. Sätt igång och dra ert strå till stacken. Vi måste hjälpas åt alla att sprida information om Esperanto.

Du har väl inte glömt ...

finsk-svenska mötet i Mariele
21-22 september 1985?

Ännu finns det några platser! Sänd anmälan till Turun Espo-yhdistys, Puolalanpuisto 4 20100 Turku, 10. Sänd också ta inbetalning för logi och mat FMK till Postkonto TU 52 - 2 omgående. Övriga uppgifter samt programmet finner du Espero nr 3/1985.

Mirindaĵoj

Preskaŭ ĉiutage oni nuntempe aŭdas, kiom malagraba, malbona, terura la mondo estas. La najbaroj parolas pri tio, la radio kaj televido rakontas kaj montras teruraĵojn el ĉiuj mondpartoj. Ne strange ke multaj homoj fariĝas pesimistoj, jes, kelkaj eĉ perdas la emon pluvivi.

Sed kial oni neniam parolas pri tio, kio estas bela, bona kaj mirinda en la mondo? Multloke oni ankoraŭ povas rigardi kaj travivi la belecon en la naturo. Ankaŭ se vi ne povas vidi la grandajn panoramojn, la imponajn montegojn kaj valojn aŭ la altajn bruegajn akvofalojn, vi povas ĝui la mirindan belecon de la malgrandaj kreaĵoj. Rigardu la graciecon de iu gramino! Pripensu kiel la verda folio per la sunenergio, de akvo el la tero kaj karbona dioksido el la aero pretigas vian manĝaĵon! Rigardu la rosguton, kiu brilas en la matena sunlumo! Baldaŭ ĝiaj molekuloj maltrankviliĝos, kaj en la varma aero la akvo flugos alten en la bluan spacon. Kaj memoru, ke multaj akvogutoj kune formas la grandajn marojn, ke ili erozias grandajn valojn kaj, portante argilon, sablon kaj gruzon, kreas novajn landpartojn! — La eta estas mirinda same kiel la granda.

Vi povas studi la ĉielon en malhela nokto. Kredeble vi miras pro la granda nombro da steloj aŭ pro la nekomprenebla vasteco de la spaco. Ekzemple nia galaksio Lakta Vojo havas diametron de 100 000 lumjaroj, kaj ekzistas nekalkuleblaj tiaj galaksioj.

Ne forgesu rigardi la homojn — de kiuj tamen la plej multaj

Nomiĝi — nomati

Oni uzas 'nomiĝi' en la senco 'esti ies nomo, havi nomon'. Plena Analiza Gramatiko en §359 Rim. II atentigas, ke 'nomiĝi' estas ne-Zamenhofa, uzata ne en la senco 'iĝi noma', sed en la senco 'esti noma' (nomhava), kaj aldone oni atentigas: »Tie ĉi necesus la formo: nomati».

Apenaŭ oni povas konsenti kun tia klarigo. 'Mi nomatas Petro' povus diri bebo (se ĝi kapablus paroli) kiun oni nun baptas, ĉar 'nomi' signifas 'signi iun per lia distinga, kutima nomo' (PIV). Tial, se mi volas prezenti min, mi diras: »Mia nomo estas XY» (ankaŭ: »Mi havas la nomon XY»). Kaj se oni demandas iun pri la nomo, oni diru: »Kio estas via nomo?» aŭ »Kian nomon vi havas?». Se oni havus liston da nomoj en la mano, oni demandus: »Kiu estas via nomo?».

Staŭura Ĉeĥoslovakio

estas bonaj kaj afablaj. De etaj ĉeloj evoluis kreaĵoj, kiuj kreis mirindajn kulturojn. Kaj tamen la homo kredeble estas nur en la komenco de sia evoluo. Kiel mirinda fariĝos fine la rezulto!

M. Markheden

ETA LINGVO — LECIONO:

JUNA — MALJUNA

5 JUNA: Li ĵus elrampis el la ova ŝelo. Havi ankoraŭ lakton sur la lipoj. En la floro de la juneco. Esti en floranta, delikata aĝo. Eraroj de juneco kaj manko de pripensu. En lia frua aĝo. Juna kaj varmegsanga. /Huligano./ Uragana juneco.

MALJUNA: Konservu sian juneccon. Vi ŝajnas almenaŭ tiel juna, keli... Ne ĉiam per la aĝo mezuriĝas la saĝo. Amare bedaŭri la perditan tempon de la juneco, la forpasintan juneccon. Jam de longe forflugis mia juneco. Forkuras, forflugas la jaroj. (Vidu: TEMPO kaj VIVO 66/3,4).

La aŭtuno de la vivo. Ĉe la sojlo de la maljuneco. En la daŭro de kelkaj semajnoj li maljunĝis je pluraj jaroj. Faltoj maljunulaj. Velkoŝrumpa maljunulino. Kurbiĝi, klinita sub la pezo de la jaroj. La aĝo kurbigas. /Ĉagrenoj maljunigas. Pagas la maljunaj jaroj por junaj eraroj.

Oni devas lernigi la infanojn montri indulgon al la maljunuloj. Honori la maljunulojn. Ne malŝatu vian patrinon, kiam ŝi maljunigis.

PROVERBOJ

*En fremdan vazon ne ŝovu la nazon.
Agu kun aliaj, kiel vi volas, ke ili agu kun vi.
Juneco ne scias, maljuneco ne povas.
Unueco donas forton.
Kiu ripetas abunde, lernas plej funde.
Ne kredu al orelo, kredu al okulo.
Parolo estas argenta, sed ora la silento.*